



# SALUTON!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ĉikago

31 Decembro 2004

№ 4

Redaktoro: Araneo

**Adreso (provizora):**  
Esperanto Societo de Ĉikago  
p/a Viktor Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
FAX: (708) 456-2750

### Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer  
Vicprezidanto – Karlo Offutt  
Sekretario – Viktoro Pajuk  
Kasisto – Karlo Gunn

### Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familio \$30; Regula \$20;  
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of our Society.  
Check should be payable to:  
**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our  
**Treasurer, Charles Gunn,**  
**828 S. Ada, Chicago IL 60607**

### Kunvenoj:

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenue, Ĉikago, IL 60625-2101.**

Kutime kunvenoj komenciĝas je **7 PM** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

**Bonvenon!**

## SALUTVORTOJ DE PREZIDANTO

Karaj geamikoj!

Kun granda ĝojo mi renkontis ĉiujn ĉe-estantojn de nia tradicia Zamenhofa bankedo, kiu kronis nian ĉi-jaran agadon. Jen finiĝas ankoraŭ unu jaro de nia malkvieta vivo. Jarfino estas oportuna tempo por la konkludoj kaj por la planoj de nia estonta aktiveco. La lastajn mi volas konigi al vi.

En la venonta jaro mi intencas kune kun vi pretigi nian societon por akcepto de novaj membroj, senpage eldonante prilingvajn dokumentojn kaj proponante interesajn programerojn. Due, ni devas plifortigi aktivan kernon de nia kolektivo, kiu volonte agas kaj finance subtenus nian E-grupon.

Trie, subtenante iniciaton de s-ro V. Mania, aranĝi oktobre konferencon por gesamideanoj de Mez-Okcidentaj Ŝtatoj. Kaj, fine, disvastigi Internacian Lingvon tra la tuta Ŝikagio (Chicagoland): ni ja posedas bonegan ilon, kiun ni devas fruktodone utiligi.

Hodiaŭ ni povas ĝui niajn libertempon kaj la festojn. Feliĉan Novan 2005 jaron al vi kaj viaj familioj! Estu sanaj por alte porti nian verdkoloran standardon!

Hodiaŭ ni povas ĝui niajn libertempon kaj la festojn. Feliĉan Novan 2005 jaron al vi kaj viaj familioj! Estu sanaj por alte porti nian verdkoloran standardon!

Roberto

## ZAMENHOFA BANKEDO.

Por esperantistoj de la tuta mondo pri la fino de la jaro memorigas naskiĝtago de nia Majstro – d-ro Ludoviko Zamenhof. Festi tiun daton de la verda kalendaro alkiutimiĝis ankaŭ ĉikaga gesamideanaro, kiu tradicie kolektiĝas dum unu el mezdecembraj dimanĉoj en iu nacia restoracio de la multnacia urbego.

Hazarde aŭ ne, sed ĉi jare ni kunvenis en tiel nomata Ukraina Vilaĝo, kie multas enmigrintoj de la plej granda (laŭ teritorio) eŭropa lando. Pro konataj politikaj eventoj en Ukrainio stratoj, arboj, bariloj, preĝejoj, bankoj de la Vilaĝo estis ornamitaj oranĝkoloro. Nia bankedo aldonis al oranĝa ĉirkaŭo verdan freŝecon.

Ni sidis en kafejo kun E-nomo – *Steloj* – kaj manĝis, babilis, tostis je la memoro de nia Majstro. Post salutvorto de societa prezidanto Roberto Stalzer kaj komuna kantado de E-himno “La Espero” sonis poemoj de Zamenhof, mirakla fluta muziko fare de Tina Seastrom, Gregoro Dolgin deklamis proprajn verkaĵojn. Duan fojon ĉi jare en Ĉikago prezentis siajn kreaĵojn nia gasto el Kentukio arta meblisto Gerardo Tobias.



#### UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –  
Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;  
toll free: 1-800-ESPERANTO  
(1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association  
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/va/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format  
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/poll.ram>

### Sekvantaj Kunsidoj:

**26an de Januaro - Omaĝe al Kent Jones** – Ĉiuj, kiuj persone konas Kent estas petataj kontakti s-inon G. Novak - ĉefan prizorganton de la kunveno laŭ tel. 773-281-1233.

**23an de Februaro – pri E-interjekcioj raportos Viktor Pajuk.** Lingvajn demandojn estas akceptataj laŭ tel. 773-344-2276 aŭ rete:  
[araneoesp @ yahoo.co.uk](mailto:araneoesp@yahoo.co.uk)

**23an de Marto (temo anoncota)** – dezirantoj bonvolu sinanonci al la sekretario.

UEA delegito en Ĉikago d-ino Gertrude Novak kurte rakontis pri la fondinto de E-societo s-ro Kent Jones, kiu forpasis komence de la jaro. Unuanime estis decidite januaran kunvenon de nia kolektivo dediĉi al lia memoro. Ankaŭ estis proponate honorigi nomon de s-ro Jones internaciskale. Kun tiu celo estraro turnu sin al ELNA kaj UEA.

Araneo

## VASIL EROŜENKO (1890-1952)

Antaŭ ĝuste 115 jaroj naskiĝis en Rusio fama ukraina esperantisto, poeto kaj verkisto, pedagogo Vasil Eroŝenko. Strange, sed pri blinda rusia migrulo liaj samlandanoj en eksa Sovetio eksciis de japanoj kaj ĉinoj, kvankam el 62 jaroj de sia vivo li nur dek pasigis en Oriento. Naskiĝinte en ne malriĉa ukraina familio li en kvar-jara aĝo pro morbito tute perdis vdkapablon kaj de tiam lia vivo dronis en eterna mallumo. Sed bonstato de la gepatroj permesis doni al la filo bonan edukon en la Moskva lernejo por blindaj infanoj, kie li fakte konatiĝis kun Internacia Lingvo. Dank'al Esperanto kaj esperantistoj li en 1912 faris ne facilan vojaĝon al Britio (tra Pollando, Germanio kaj Francio). Eĉ pasigis kelkajn monatojn en La Londona Reĝa Muzika Akademio por Blinduloj, perfektigis sian gitarludon kaj eklernis anglan lingvon.

Sed li revis pri Japanio kaj en 1914, reveninte el Eŭropo, li vojaĝis orienten. Tie li instruis en Tokia Universitato muzikon, rusan lingvon kaj Esperanton, eklernis japanan, ekverkis japane fabelojn por plenkreskuloj, ekagis kiel politikisto.

Oriente li vizitis ankaŭ Baraton, Siamon (Tajlando), organizis en Birmo lernejon por nevidantaj infanoj (kaj ĉie lernis lokajn lingvojn – li konis entute preskaŭ 20). En Ĉinio Vasil instruis E-on en la Pekina Universitato kaj nome tie aperies lia unusola E-libreto *Ĝemo de unu soleca animo* (legu sube poemon *Homarano* el ĝi).

Ekbruligis mi fajron en kor' –

ĝin estingos nenia perfort'.

Ekflamigis mi flamon en brust' –

ĝin ne povos estingi eĉ mort'.

Brulos fajr' ĝis mi vivos en mond'.

Flamos flam' ĝis ekzistos la ter'.

Nom' de l' fajr' estas am' al homar',

nom' de l' flam' estas am' al liber'.

En tiu tempo Eroŝenko dufoje vizitis Universalajn Kongresojn de E-o kaj dum Nurnberga eĉ gajnis unuan premion pro la deklamado de sia poemo *Antaŭdiro de ciganino*, kiun enmanigis al li la unua historiisto de E-movado E. Privat.

Reveninte en 20-aj jaroj al Sovetio Vasil, sciante de multaj orientaj lingvoj, rifuzis kunlabori kun sekreta polico kaj estis fakte ekzilita al Mezazia respubliko – Turkmenio, kie li estris lernejon por blinduloj kaj aŭtoris la unuan turkmenan abocon por nevidantoj. Vizitinte landon de ĉukĉoj (malproksima nord-oriento de Sovetio) li verkis kelkajn E-novelojn pri tiesa vivo.

V. Eroŝenko mortis pro kancero post la dua mondmilito en la gepatra vilaĝo Obuĥivka. Lia arĥivo estis forbruligita.

Antaŭ nelonge oni nomumis lin “Ukraina E-isto de la XX-a jarcento”.

Viktoro